

# Letero de la Paco adresita al la UN

Tiu ci letero ne estas frukto de definitiva ideologio  
Gi bacigas nur sur evidentajoj.

Subskribi tiun ci Leteron implicas neniun rilaton nek engagon kun gajaj iniciatintoj. Espereble tamen ke tiuj kiuj gin favoras, iniciatu mem konkretajn porpacajn arangojn, je la vido de tiuj ci evidentajoj.



Geomikoj,

Preskau ni ciuj deziras la pacon el nia plej profunda interno. Malgrau cio, estas evidentaj la tragikaj kaj dauraj pacorompoj inter la diversaj popoloj de la mondo. Estas nefacile serci taugajn solvojn por gin atingi. Estas multaj malfacilajoj.

Tiu ci Letero de la Paco dezirus elstarigi kelkajn principojn, kiuj helpu superi tiujn malfacilajojn kaj samtempe proponi la fundamenton, sur kiu oni povus pli firme konstrui la pacon.

I.- Ni la nuntempuloj ne kulpas pri la okazintaj malbonajoj en la Historio, simple car ni ankoraŭ ne ekzistis.

II.- Kial do ni havu kaj nutru reciprokajn rankorojn, se ni entute ne respondecas pri tio kio okazis en la Historio?

III.-Se tiuj absurdaj rankoroj eliminigas, Kial ne amikigi kaj kunlabori por la totala konstruo de pli justa, pli solidara kaj pli kontentiga mondo por niaj gefiloj kaj por ni mem ?

IV.-Utilas plej bone koni la Historion. Konstateblas tamen ke ni ne povas igi gin retroiri. Ni konstatas ankaŭ ke, se la Historio estintus malsama-pli bona au pli malbona- tio kio okazis estintus malsama. Laŭlonge de la tempo aliaj renkontigoj, aliaj interligoj okazintus; aliaj homoj naskintus, sed ne ni . Neniu el la nun ekzistantaj homoj ekzistus. Tio ne signifas ke la malbonajoj okazigitaj de niaj antaŭuloj ne estis realaj malbonajoj. Ni kritikis ilin, ni ilin rifuzas kaj ni devas deziri ke ili ne ripetigu.

V.- La homoj, pro la fakto de sia ekzisto, havas fundamentan rilaton: ni estas gefratoj en la ekzisto. Se ni ne ekzistus, ec ni ne povus esti samsangaj kun iu. Konstati tiun elementan fratecon en la ekzisto pli facile igos nin solidarajn car ni malfermigis al la socio. La surprizo ke ni ekzistas faciligos ke la nuntempuloj klopodu kun gojo plibonigi la nunajn konsekvencojn pro la antaŭaj malbonajoj al ni.

VI.-En la aktuala organizado de la novaj sociaj strukturoj, kiujn oni konsideras oportunaj por konstrui pli solidan kaj pacan socion, plurfoje estas risko bazi ilin sur aliaj antikvaj, ec se ili

konvenis siatempe. Estas pli taŭge bazi la novajn strukturojn sur homaj geografiaj unuoj, kaj per tio eviti la riskon ke ili fermigu en si mem, ĉar tio preskaŭ ĉiam kondukas al ĉiuspecaj malkonsentoj kaj eĉ al militoj.

VII- La homo estas libera, inteligenta kaj amkapabla. La amon oni ne povas devigi nek altrudi; ankau ĝi ne povas blinde sed lucide ekzisti. Ĝi libere kaj klare aperas au ĝi ne estas autentika. Ĉiam kiam ni limigas la liberecon al kiu ajn au ni malhelpas al li la klarecon, ni estas evitintaj ke li amu nin. Tial, defendi, faciligi, evoluigi la veran liberecon de la homoj-kio inkludas en si mem kunrespondecan socian dimension-faciligas la elkoran interhoman estimon, kaj tiel povu pli bone konstrui la pacon.

VIII- La nunaj reprezentantoj de tiuj institucioj kiuj pludauris dum la Historio, estas neresponecaj de tio kio okazis en la pasinteco, ĉar ili tiam ne ekzistis. Tamen por faciligi la pacon, tiuj reprezentantoj devas publike bedaŭri, kiam estos prudente, la malbonaĵojn kaj maljustaĵojn kiujn oni faris nome de tiuj institucioj dum la historio. Ankau devas institucie kompensi, laŭeble, la okazintajn damaĝojn.

IX.- La prapatroj respondecas pri la ekzisto de aliaj estaĵoj. Tial kun la socia solidara kunlaboro, ili devas faciligi al la filoj, ĝis sia morto (speciale se temas pri mensmalsanuloj au kun malforta volo) la sufiĉajn rimedojn kaj helpojn - ĉefe lasi al ili kiel heredajon pli pacan mondon- por ke ili disvolvu sian vivon kun homa digno, ĉar la filoj ne petis ekzisti.

Aliflanke la gejunuloj rajtas ke oni instigu kaj entuziasmigu ilin pri la gojo ekzisti laŭ la ekzemplo de la gepatroj, de la familio kaj de la socio.

Same pri la laboro, perfektigante pri tekniko kaj scienco laŭcelo ke ili povu kunlabori por atingi pli pacan mondon.

Evidentigas ke oni ne povos komplete konstrui la pacon, dum ene de la socio kaj eĉ de la familioj estu malestimo kontraŭ ĝia duono: virinoj, infanoj, maljunuloj, marginuloj: male la rekono kaj respekto de iliaj digno kaj rajtoj faciligos atingi la pacon.

X.- Daŭre kreskanta nombro da landoj rekonas nun, ke ni ĉiuj havas la rajton libere pensi, esprimigi kaj grupigi kun ĉiama respekto por aliaj digno kaj rajtoj. Same, ĉiu homo rajtas vivi sian vivon en tiu ĉi mondo kohere kun siaj sinceraj pensoj.

La demokratioj, devas do fari kvalitan salton laŭcelo defendi kaj ankau faciligi, ke ĉiu homo vivu laŭ sia konscienco, sen neniam atenci -kial diri tionnenies liberecon nek provoki damaĝojn al aliaj nek al vi mem.

Sen rankoroj, ekde la libereco, la evidentajoj kaj la amikeco oni povas konstrui la pacon.

Danko, geamikoj...

*Podato:*

*Estas tasko de la regantoj koncentri siajn celojn por la bono de la nuntempuloj, tial ke ili jam ekzistas kaj rajtas vivi sian vivon kun homa digno, sen tio ke la bono de la nuntempuloj malutilu la ekologia ekvilibron de la estonteco.*

*Se nacio pro la agado de siaj politikistoj, daŭre plibonigas, la interrilatoj inter la nuntempaj civitanoj evoluos ĝuste kaj kontentige kaj naskigos filoj, kiuj gojos ke la lando progresadis, ĉar danke al tio estigis la taŭgaj kondiĉoj por la renkonto de la adoltoj, kio ebligis la ekziston de tiuj*

*filoj.*

*Se kelkaj nacioj male sin regas malbone, la interpersonaj rilatoj de la adoltoj tiam ekzistantaj evoluos en alia pli malfacila maniero kaj tial aliaj renkontoj, rilatoj, ktp. okazos kaj naskigos malsamaj estajoj ol tiuj kiuj estas naskintaj se la nacio evoluintus pli bone. Tiuj naskigintaj en tuij aliaj cirkonstancoj, same gojos ke la aferoj ne tiel bone disvolvigis en siaj landoj, car male, ili guste ne estus generitaj. Memevidente tiuj novaj civitanoj devos klopodi por plibonigi la situacion kiam adoltoj.*

*Evidentigas do, ke en kiu ajn lando, la estontaj civitanoj, kiuj ajn, ciam gojos ke la koncernaj regantoj agis -bone au malbone- car danke al tio ili ekzistas. Tial la bono de la nuntempuloj estas la plej grava celo de la regantoj.*

1996 © UNIVERSITAS ALBERTIANA